

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 5

novembro / decembro 1992

Gravaj decidoj en Fulda

La 17an de oktobro kunvenis en Fulda la laborkomisiono de BSW-ĉefestraro (Arbeitsausschuß) kun la distriktaĵaj specialaj komisiitoj. Krome ĉeestis la reprezentanto de BSW-DR-ĉefestraro, s-ro Petzold (Berlin) kaj tri kolegoj de la fakgrupoj DR. Plej grava punkto de la tagordo estis la kunigo de la Esperantogrupoj en la terenoj de DB kaj DR. Ĝi jam estis anoncita en la IFK Münster kaj nun findecidita kun efiko de 1.1.1993. Tamen necesas jam nun publikigi la ŝanĝojn, kiuj koncernas la membrojn de la laborkomisiono (estraranoj de GEFA). La intencita eksprezidantiĝo de J. Gießner ne okazis. Li deklaris sin preta, provizore daŭrigi la gvidadon, ĉar la momente iom komplika situacio (DB/DR) kaj aliaj neantaŭviditaj aspektoj malfavorigas tian ŝanĝon. Krome la redaktoro de Bulteno, pro sanstato fordonas sian taskon. Kuntransprenos ĝin la prezidanto. La taskojn de viceprezidanto, protokolado kaj parton de korespondado prilaboros O. Rösemann. La administrado de la BSW-financrimedoj restos en manoj de H. J. Riehn. Kvara membro de la laborkomisiono fariĝos A. Meinel, la prezidanto de la DR-kolegoj. Li transprenos la komunikadon al la amaskomunikiloj kaj la jarraportojn por IFEF.

Pluraj ŝanĝoj okazos rilate al la specialaj komisiitoj: Retiriĝas laŭ propra deziro E. Kruse (prizorgantino de la emerituloj) kaj W. Barnikel (gazetaro, specialaj taskoj). La oficon de la unua transprenos R. Terjung. La taskoj de la dua iros al A. Meinel.

Datoj de kelkaj aranĝoj en 1993

La **printempa kunveno** de la laborkomisiono kun la komisiitoj okazos sabaton, la 3an de aprilo denove en Fulda, Renkontiĝo de **emerituloj** jaŭdon 22.4. antaŭvideble en Duisburg. **Jarkunveno** 1. aŭ 2. semajnfino en oktobro en regiono de Freiburg.

Neue Redaktionsanschrift

Ab Nummer 1/93 wird das Bulteno in Herzberg bearbeitet. Die Anschrift der Redaktion lautet: Joachim Gießner, An der Nicolaischule 3, W-3420 Herzberg am Harz, Tel. 0 55 21 / 45 86, oder mit EDS: BARaD Gießner, Bf 3420 Herzberg/Harz.

Bitte **ab sofort** alle Beiträge an eine dieser Anschriften senden.

Jarraporto pri la periodo de la 35a ĝis 36a jarkunvenoj (1991/1992)

Enkonduko

Kiam oni relegas la enkondukon de la pasintjara raporto, ne alie eblas, ol kvazaŭ skribi daŭrigon de ĝi. La maltrankvileco, la militoj, ĉu deklaritaj aŭ ne, ĉie en la mondo daŭras kaj kun ili la nesekureco por la homoj. Kaj oni nek povas nek rajtas pretervidi, ke la Esperanto-movado, suferas, pro tia evoluo.

Ĉar GEFA estas parto de la Esperantomovado, ĝi same suferas. Kvankam la rilatoj inter la du germanaj fervojoj dum la raporto-periodo konsiderinde solidiĝis kaj ambaŭ nun funkcias sub komuna gvidado, la problemoj neniel malpliĝis. Male! La venontaj

strukturoj antaŭjetas sian ombron. La historie kreskinta bildo de la fervojo, sed ankaŭ de la fervojista komunumo, ne plu validas, la sociala kaj familia etoso inter la fervojistoj paliĝas, kvankam ne libervole. La grundo, sur kiu dum pli ol cent jaroj povis kreski la socialaj atingiĝoj, inter ili la Sociala Organizo BSW kun siaj kulturaj grupoj, komenciĝas sekiĝi. La principoj, laŭ kiuj la fervojo pli kaj pli intensive estas gvidata, ne plu lasas multe da spaco por neekonomiaj aferoj. Kun tia situacio GEFA devas ekzisti.

Niaj mortintoj

Forlasis nin ĉi-jare jenaj membroj, pri kies morto ni eksciis:

Gustav Stöblein (80) 22.1.

Paul Steinig (85) 24.1.

Ili ripozu en paco. Decas menciis, ke Paul Steinig de 1957 ĝis 1960 estis redaktoro de "Bulteno" kaj aktive kunlaboris en sia grupo en Bremen.

Naskiĝtago Ni oficiale gratulis al Willi Graß (75), vidu la omaĝon en ĉi-numero.

1. Organizaj aferoj

1.1 Membrostato

La de jaroj konstanta malkreskado de la membronombro bedaŭrinde daŭris. Al BSW ni anoncis 373 membrojn kompare al 386 en antaŭa jaro. La elcentaĵo de emerituloj same daŭre plialtiĝas. Kvankam kelkaj aktivuloj iam kaj tiam sukcesas altiri novan membron, la perdoj superas tiujn klopodojn. La kialoj menciitaj sub 1.1 en la pasintjara raporto, same nun validas, eĉ pli graviĝis.

1.2 Kursoj

Okazis entute 3 kursoj, el ili unu memstara kaj du surbaze de partoprenado en nefervojistaj kursoj. Teorie ili devus havigi al GEFA novajn membrojn. Ne estas klare, kial tio apenaŭ okazas. La telekursoj daŭre vendiĝas favore. Entute ĝis nun de kurso unu estas venditaj 351 ekzempleroj, de la dua 72 ekz. Sed same daŭre inter la kursanoj estas nur malmultaj fervojistoj. Tamen valoras la tre ampleksa kaj akurata laboro ligata al tiuj kursoj.

1.3 Funkciuloj

Neniu ŝanĝo. La pasintjare flanke de BSW en

la kulturaj grupoj kreitaj "gazetaraj informantoj (Pressesprecher) kaŭzis ja laboron al GEFA, sed apenaŭ efikis.

1.4 Rilatoj inter GEFA kaj Fakgrupoj DR

En la 44. IFK estis diskonigita la kunigo de la du organizoj kun efiko de 1.1.1993. Ĝis tiam IFEF ankoraŭ havas 2 germanajn landajn asociojn.

2. Kunlaboro kun IFEF

La **44a IFEF-kongreso** okazis en Germanio de la 16a ĝis 22a de majo en Münster. Partoprenis ĝin 352 personoj el 22 landoj. Komparu "Bulteno" 3/92 kaj "Internacia Fervojisto" 4. En la kunsidoj GEFA estis reprezentita de la komitatanoj Gießner, Herlitze kaj Rösemann. La gvidanto de la Terminara Komisiono, nia membro Hartig, ne povis ĉeesti pro malsano, sed estis preparinta fakprelegon pri la terminara laboro en IFEF. La faka flanko de la kongreso estis forte akcentita per dua fakprelego de d-ro Bormann pri la "Merkato de la trafikservoj" kaj per ekskurso al la magnetfervojo en Lathen. La kutimaj kulturaj kaj ekskursaj programeroj ne mankis kaj ĝenerale estis laŭditaj kiel altniveloj same kiel la bela kongreslibro kun ĝia praktika programaldonaĵo. Dum kaj post la kongreso estis adresitaj al GEFA multaj dankvortoj pri la modela organizado kaj funkciado, kiujn oni rajtis danki al la same modela laboro de la LKK-anoj kaj helpantoj. En la inaŭguro parolis eminentaj gastoj, la plej multaj en Esperanto. La tuta kongreso estis favorigita de bela vetero. Pro diversaj cirkonstancoj ĝis malmultaj tagoj antaŭ la kongreso ne estis klare, el kiuj landoj de l' iama Orienta Bloko venos kongresanoj kaj kiom da ili. Tio esence komplikigis la planadon. Aldoniĝis nekomprenebla sintenado de kelkaj DB-instancoj kaj burokratismo de germanaj eksterlandaj konsulejoj. Sed danke al komprenemo kaj tre aktiva helpo flanke de BSW-distriktestraro Essen kaj de la estroj de ĉefstacio kaj lokomotivejo Münster fine eblis loĝigi grandajn grupojn el PL, CS, BG kaj RO en 3 germanaj kuŝvagonoj.

La unuan fojon en la historio de IFEF oni prezentis en la 44a IFK "Fervojfakan Kajeron", en

kiu ankaŭ du germanaj aŭtoroj kontribuis per artikoloj, nome d-ro Heinz Hoffmann kaj Joachim Gießner. **Postkongreso** sekvis en la nordorienta parto de la Harz-montaro de 1a 23a ĝis 28a de majo en Friedrichsbrunn kun 27 partoprenantoj el 7 landoj. Tio estis la lasta aranĝo, kiu okazis sub respondeco de kolegoj de DR, kvankam jam kun praktika helpo de GEFA. Tiuj tagoj ĉefe havis turisman kaj kulturalan karakteron. Dum ĉiam suna vetero ĉiutage okazis belaj ekskursoj tra la montaro kaj al historiaj urboj. Sed la etŝpuraj fervojaj linioj aldonis ankaŭ fakajn interesojn, kaj la restaĵoj de la forigita german-germana limo fariĝis grava instruado precipe por la eksterlandanoj.

3. Aranĝoj, kontaktoj

La 35a jarkunveno okazis la 11an ĝis 13a de oktobro 1991 en Friedrichshafen (v. raporton en Bulteno 5/91). Samtempe BAVELO /Baden-Württemberg. Esperanto-Liga) aranĝis sian jarkongreson. Krom la jarkunveno okazis LKK-kunsido por la 44a IFK. Pliaj LKK-kaj preparakunsidoj sekvis en la postaj monatoj. Kiel kutime GEFA-membroj partoprenis en diversaj naciaj kaj internaciaj aranĝoj, ekz. en UK Wien, IFEF-skisemajno Vratna (Slovakio), GEA-kongreso Schwerin ktp. Prezidanto Gießner ĉeestis en septembro internacian renkontiĝon, kiun aranĝis la rumana IFEF-asocio en Brasov. Ĉefpunkto estis la novordigo de la rumana FISAIC-sekcio, en kiu Gießner konsiderinde kunlaboris jam de 2 jaroj kaj precipe de post la 44a IFK. Gießner same ĉeestis kiel reprezentanto de la germanaj fervojistaj esperantistoj en la festo okaze de la 40a jubileo de FISAIC en oktobro 1992 en Millau (Francio). En la samtempe okazanta ĝenerala asembleo oni tie uzis unuafoje Esperanton kiel trian laborlingvon. Gießner transprenis la kurantan interpretadon inter la germana kaj Esperanto dum la debatoj. La daŭra aplikado de Esperanto en FISAIC ankoraŭ ne estas definitive decidita.

4. informado, varbado

4.1 Bulteno

Ĝi aperis per 5 regulaj numeroj kun entute 36

paĝoj, sur kiuj troviĝis 6 fotografaĵoj.

4.2 Gazetaro, radio, televido

Ni eksciis pri 80 artikoloj, kiuj concernis nian agadon kaj/aŭ kiujn verkis GEFA-membroj. Ili aperis en tagaj gazetoj kaj en fakaj, sindikataj kaj BSW-revuoj. Aparte ĝojigan eĥon havis la 44a kongreso. Du gazetaraj konferencoj rezultigis 4 sufiĉe favorajn artikolojn; sekvis 4 intervjuoj flanke de radio kaj unu de TV. La ĉefurbestro uzis Esperanton en sia inaŭgura parolado.

4.3 Informiloj, ekspozicioj

Pli ol mil informiloj estis disdonitaj en deĵorejoj, lokaj BSW-oficejoj, en vendejoj, trajnoj kaj alimaniere. Ankaŭ afiŝoj estis elpendigitaj. La bela, trikolora leteroglumarko **"Esperanto - deine zweite Sprache"** estas nove eldonita en dekmil ekzempleroj (vidu Bulteno 4/92) kaj nun denove havebla. Ekspozicioj kun ĉ. 2500 vizitantoj okazis en 3 urboj.

5. Terminara agado

Dieter Hartig, kiu post eldono de la ĝenerala Fervoja Terminaro tuj komencis labori pri la nun planita Nacia Vortaro (NV), estis grave malhelpita unue pro la pli urĝa faka preparado de la kongreso en Münster kaj poste pro subita malsaniĝo. La teksto de NV ja estas stokita en komputilo, sed estos farendaj ankoraŭ korektoj, kiuj venis de kunlaboranto Theurich kaj el Svisio.

6. Emerituloj

La 16an de aprilo 1992 okazis en Hildesheim la renkontiĝo por la emerituloj sub konate lerta gvidado de Elfriede Kruse. Ĉeestis 37 personoj, inter ili eĉ el Bavario (v. Bulteno 3/92).

Perspektivo

Se vi ne legis la enkondukon, faru tion nun. Neniām mi estis pesimisto. Tial mi konstata, ke la enkonduko ne estas pesimisma. Sed ĝi estas realisma. Kaj tiu realismo minimume ne povas provoki optimismon. Tiun situacion ni vole-nevole devas ekkoni. Ĝi povus fariĝi same danĝera kiel la malpermesoj fare de iamaj diktatoraj sistemoj, ĉar ĝi ja ne perforte,

sed apenaŭ rimarkeble efikadas. Tial ne nur ekkonu, sed agu, AGU! Seninterrompe validas: Nenio malhelpas agi kaj altiri novajn adeptojn. Tio estas tasko nepre necesa. Neniu estas tro aĝa por kunhelpi en tiu tasko. De ĝia plenumado dependos la sorto de GEFA.

Joachim Gießner
prezidanto

Danko al tri aktivuloj

Kiel vi povas legi sub "Gravaj decidoj en Fulda", eksiĝas el sia longdaŭra aktiveco **Elfriede Kruse, Willi Barnickel** kaj **Willi Graß**. La sumo de sindona agado de tiuj tri personoj dum pli ol tri jardekoj nek estas mezurebla nek priskribebla nek kompansebla. Ili iam lernis Esperanton kaj poste trovis en ĝi parton de sia vivenhavo. Ili fariĝis esperantistoj en plej bona senco de tiu vorto, duoble ligitaj al la lingvo kaj ties ideo per la koro kaj per la profesio. Ili fariĝis membroj de la familio de fervojistaj esperantistoj kaj restis inter la plej aktivaj. Nun venis la tempo por retiriĝi.

Nia asocio neniam fordonis medalojn aŭ dankdokumentojn. Se tiaj ekzistis, la tri devus ricevi. Sekve nur eblas en tia kazo diri "dankon!" Dankon pro ĉio, kion ili farias por la asocio, por la fervojista "familio", por la nobla ideo de Esperanto entute. Ili ne teorumis, sed praktike kunkonstruis en la komplika problemaro "interkompreniĝo inter la popoloj". La konscio, ke ili tiel vekis en multaj homoj la scion, ke apud multe da malbono en la mondo ankaŭ ekzistas bono kaj komprenemo, tiu konscio estu la plej valora kompenso por ili.

Jen ni tutkoncize, nekomplete (komplete simple ne eblas) kaj per sobraj vortoj skizas la Esperanto-aktivecojn de la tri "GEFA-emerituloj":

Elfriede Kruse GEFA-sekretariino (1957 – 75), kunlaboro en la LKK-oj de IFK Fulda (67), Regensburg (81) kaj Münster kiel helpantino (92), kunlaboro en fervojistaj Esperanto-skipoj en UK Mainz (59), Hamburg (74) kaj Augsburg (85), IFEF-sekretariino (68 – 80), ekde 1973 ĝis nun prizorgado de la emerituloj, partopreno en dekoj da IFK same kiel en la GEFA-jarkunvenoj, ofte reprezentis GEFA en eksterlandaj aranĝoj, antaŭ ne longe tradukis la libron "Mosefahrt aus Liebeskummer".

Sĭ ricevis la oran medalon de FISAIC kaj la medalon de GEA "Pro la merito". Estas Honora Membro de IFEF.

Willi Barnickel Membro en GEFA-estraro, kompetenta por varbado/informado (57 – 68), prizorgis la tradukon de 8 prospektoj de DB (54 – 60), dum 30 jaroj zorgis per ofta apero de anoncoj pri DB en UEA-jarlibro kaj pri Esperanto-servoj en informiloj de DB, konceptis afiŝojn kaj glumarkojn, tradukis diversajn internaciajn reglamentojn fervojajn, kunlaboris en LKK-oj de IFK Fulda, Regensburg, Münster same kiel en fervojista skipo en UK Mainz, liveris multnombrajn raportojn kaj kontribuadojn por Bulteno kaj aliaj revuoj, partoprenis en dekoj da IFK kaj GEFA-jarkunvenoj, fojfoje reprezentis GEFA en aliaj aranĝoj, kunlaboris en starigo de IFEF-staŭtoj.

Willi Graß distriktkomisiito en Wuppertal (ĉ. 62 – 75), redaktoro de Bulteno (67 – 92), viceprezidanto (ĉefe kunpreparado de jarkunvenoj (72 – 90), partoprenis en dekoj da IFK kaj GEFA-jarkunvenoj kunlaboris en LKK de IFK Regensburg.

Joachim Gießner

Angebot für Sammler

Folgende Restbestände vom Kongreß in Münster werden angeboten:

Postalisch gelaufenes Material

Sonderumschlag je Stück	2.50 DM
Sonderpostkarte je Stück	2.00 DM
Postkarte mit Bild ICE je Stück	2.00 DM
alle drei zusammen	5.00 DM
Sonderumschlag mit	
Gefälligkeits-Esperantostempel	2.00 DM
3 Stück	5.00 DM
Kongreß-	
Briefverschlusmarke je Stück	0.30 DM
jeweils zusätzlich Versandkosten.	
Bestellungen erbeten an Werner Heimlich, Fröbelstraße 4, W-3040 Soltau	
Unter derselben Bestellschrift werden angeboten:	
Esperanto-Gefälligkeitsstempel auf Postkarten oder Briefumschlägen.	
50 verschiedene aus China,	
Ungarn, Polen je Land	40.- DM

20 verschiedene aus DDR, BRD,
Spanien und Schweden je Land 15.– DM
20 verschiedene Esperanto-
stempel auf Sonderpostkarten
oder -umschlägen aus
China, Spanien je Land 30.– DM
Es werden auch Bestellungen aus Fehllisten
erledigt.
Jeweils zusätzlich Versandkosten.

GEFA

El la grupoj

München. Okaze de la "Esperanto-Kongreso por la pliaĝa generacio" en Augsburg (05. – 12.09.1992) GEFA-membro Josef Weidacher prelegis pri "ICE – trajno de l'estonteco; nova trajno de Germana Fervojo". Elokvente li priskribis detale la plurjaran evoluon de tiu moderna kaj eleganta trajno. La prelegon sekvis la aŭskultantoj kun granda intereso.

Resolution des Deutschen Esperanto-Bundes e. V. anläßlich der ausländerverfeindlichen Gewalttaten

"Der Deutsche Esperanto-Bund e. V. ist als Vertreter einer Bürger- und Kulturbewegung, die sich seit über 100 Jahren für Verständigung und Frieden zwischen Menschen verschiedener Nationalitäten einsetzt, in besonderem Maße über die derzeitige Welle der Gewalt gegen Ausländer in Deutschland empört. Mit Abscheu und Entsetzen sehen wir, wie Chauvinismus und Rassismus mit blindwütigem Haß in Deutschland immer mehr um sich greifen und unsere Demokratie in Frage stellen. Wer heute zusieht, wie Ausländer geschlagen werden, muß morgen zuschauen, wie Bücher verbrannt und wie übermorgen ganze Bevölkerungsgruppen ermordet werden. Die Behauptung, Deutschland sei "kein ausländerverfeindliches Land", wird zum blanken Hohn.

Der Deutsche Esperanto-Bund e. V. fordert deshalb:

- einen wirksamen Schutz gegen Angriffe auf Leib und Leben von Menschen und ein entschlossenes Vorgehen von Polizei und

Justiz gegen die unbelehrbaren Gewalttäter;

- einen umfassenden Dialog zwischen Gesellschaft und Politik auf allen Ebenen, der die entstandene Entfremdung überwindet und nach Lösungsmöglichkeiten für die vorhandenen Probleme unter Berücksichtigung ihrer Ursachen sucht;
- ein geschlossenes und aktives Eintreten aller Demokraten in einem "Netz der Solidarität" gegen den Terrorismus von rechts, indem wir die Werte der Demokratie, der Freiheit und der Menschenrechte stärker als bisher zur Basis der Identifikation mit unserem Gemeinwesen machen und so das nationalistiche Element schwächen. Wer sich als Deutscher bezeichnet, muß für diese Werte, auf die wir seit 40 Jahren stolz sein sollten, eintreten. Jeder, der unsere Werte so mit Füßen tritt, stellt sich gegen unsere Gesellschaft und muß die im Rechtsstaat vorgesehenen Konsequenzen tragen.

Unsere Landsleute und unsere Freunde in aller Welt sagen wir: Dies tolerieren wir nicht! Derartige Untaten sind nicht entschuldbar. Wir appellieren an unsere Mitglieder und an alle Esperanto-Freunde, mit noch größerer Zivilcourage als bisher für den Schutz unschuldig bedrohter Menschen einzutreten."

Eisenbahner-Esperanto-Kongreß in Italien

Der Internationale Verband der Eisenbahner-Esperantisten (IFEF) lädt wiederum zur Teilnahme am alljährlichen Kongreß ein, und zwar nach Cervia am Adriatischen Meer. Cervia in der Provinz Romagna liegt an der Eisenbahnstrecke Rimini – Ravenna und ist für deutsche Teilnehmer gut zu erreichen. Auch der Zeitpunkt ist günstig gewählt, denn die Tagung findet zu Beginn des Sommers statt, vom 6. bis 12. Juni 1993.

Unsere italienischen Kollegen setzen alles daran, die vorangegangenen IFEF-Kon-

grosse in Italien (Rimini und Rom) zu über-
treffen. Cervia ist ein geschätzter, auch von
Deutschen gerne besuchter Badeort. Ein
breiter Sandstrand mit Pinienwäldern und
ein elegantes Kurzentrum laden zur Erho-
lung ein. Wir wollen uns aber vor allem mit
Kollegen und Freunden aus vielen Ländern
treffen. Ohne Verständigungsschwierigkei-
ten, weil Esperanto uns den sprachlichen Zu-
gang zu Menschen anderer Länder und
Sprachen erleichtert.

Das Kongreßgebäude liegt in der Nähe des
Jahrhunderte alten Wachturms des Hl. Mi-
chael. Er wurde zum Schutz gegen die Salz-
piraten errichtet. Einer der Fachvorträge be-
faßt sich mit der Entwicklung des italieni-
schen Schnellbahnverkehrs, ein anderer mit
dem künftigen Eisenbahnverkehr nach
Großbritannien. Berichtet wird auch über die
Arbeiten an den zweisprachigen Fachwör-
terbüchern und über Neuerungen bei den
europäischen Bahnen. Die Organisatoren
sehen ferner eine anspruchsvolle Konzert-
veranstaltung vor sowie einen Folklore-
Abend, nicht zu vergessen, den beliebten in-
ternationalen Ball.

Das touristische Angebot führt drei Ausflüge
auf, davon einen ganztägigen. **Ravenna** ge-
hört zu den künstlerisch bedeutendsten
Städten Italiens. Sie ist eine klassische Stätte
der altchristlichen und spätantik-byzantini-
schen Kunst. Sehenswert sind vor allem die
Mosaiken in einigen Basiliken aus dem 6.
Jahrhundert. Besucht wird auch **Gradera**,
ein hochgelegenes mittelalterliches Städt-
chen mit Stadttoren, Wehrgängen und einer
Burg aus dem 13. Jahrhundert. Nach
Faenza, an der Via Emilia gelegen, sind die
Erzeugnisse der Töpferkunst als "Fayencen"
benannt. Dort kann man vielleicht einen
künstlerisch bemalten Teller aus Keramik als
Andenken erwerben.

Nun zu den Kosten. IFEF-Mitglieder überwei-
sen mit der Anmeldung mindestens

- den Kongreßbeitrag
bis 14. Februar 1993 88.– DM
ab 15. Februar 1993 110.– DM
- die Gebühr für
Zimmervermittlung 6.– DM

- die obligatorische Anzahlung für das Hotel
(Doppelzimmer mit Dusche und WC je
Person, nur Übernachtung 61.– DM
mit Vollpension 122.– DM

Die Hotelpreise variieren zwischen 43.– DM
und 116.– DM je Nacht und Person. Für 25.–
DM kann man in einem Mehrbettzimmer
übernachten. Das Verbandsorgan Interna-
cia Fervojisto und der Anmeldevordruck, er-
hältlich bei Ihrem Bezirksbeauftragten, ent-
halten die Preise für alle Leistungen ein-
schließlich der Ausflüge. Die Preise sind in
italienischer Währung angegeben und vor
der Überweisung nach dem Tageskurs in
DM umzurechnen.

Italien ist zwar kein billiges, aber noch ein
preiswertes Land. Daher sollten Sie auch
das Angebot eines **Nachkongresses**
wahrnehmen. Hierfür ist eine besondere An-
meldung erforderlich. Von Vorteil ist, daß die
Teilnehmer der dreitägigen Veranstaltung
ihre Übernachtungsmöglichkeit in Cervia
beibehalten können. Von den ganztägigen
Ausflügen für zusammen 300.– DM ist be-
sonders die Fahrt nach **Venedig/Venezia**
hervorzuheben. Dort locken Schätze der
Baukunst und der Malerei Besucher aus aller
Welt herbei. Die einzigartige Stadt an der La-
gune ruht auf 117 kleinen Inseln, die von 150
Kanälen durchzogen und durch mehr als 400
Brücken miteinander verbunden sind. Wer
den italienischen Wein schätzt, wird mit nach
Bertinoro fahren, dem Mittelpunkt eines
bekannten Weinbaugebietes. Die reizvolle,
kleine Stadt mit ihren mittelalterlichen Bau-
ten und einer Burg öffnet sich gerne ihren Be-
suchern. Unter den weiteren Fahrtzielen ist
besonders die Stadt **Urbino** zu erwähnen. In
der Renaissanceperiode entstanden dort
sehenswerte Kirchen und der Herzogspa-
last.

Der 45. IFEF-Kongreß wie auch der Nach-
kongreß werden für uns Eisenbahner-Espe-
rantisten und sonstige Freunde der interna-
tionalen Sprache Höhepunkte im Jahre 1993
sein. Die Vereinigung deutscher Eisenbah-
ner-Esperantisten im Bundes-Sozialwerk
rechnet daher mit einer stattlichen Teilneh-
merzahl ihrer Mitglieder. Auch die Sprach-

freunde aus den neuen Bundesländern sind herzlich eingeladen. Auf Wiedersehen im Juni 1993 in Cervia.

W. B.

Main-Donau-Kanalo malfermita

Post multjara konstruado estas inaŭgurita en septembro 1992 la Main-Donau-Kanalo. La kostoj estis grandegaj. Proksimume ses miliardojn da germanaj markoj pagis la germanaj impostpagantoj. Plenumiĝis revo, kiu komenciĝis jam 1200 jarojn antaŭe. Spurojn de kanalo komencita dum la regado de imperiestro Karlo la Grandulo rigardis GEFA-anoj okaze de sia jarkunveno en Treuchtlingen.

Do la kanalo, kiu interligas la bavarajn havenurbojn Bamberg kaj Kelheim, estas preta. Ĝi ofertas rektan navigadon inter Nederlando kaj Nigra Maro (3500 km). Sed jam de post dudek jaroj, kiam komenciĝis la konstruado, la ekonomia utilo de tiu kanalo estis pridubata. La kalkulita maksimuma transportkapacito estas 14 milionoj da tunoj po jare, sed laŭ opinio de ekspertoj ne ekzistas sufiĉe da konvenaj kargoj por plene eluzi la disponeblan kapaciton. Unuflanke reduktiĝas dufojaj transkargoj de varoj, ĉar la fervojo ne plu transportas ilin transite tra Germanio, aliflanke kreskas la transportdaŭro konsiderinde, se estas uzata por la transporto nur la akvovojo.

Ambaŭ transportsistemoj, ŝipo kaj fervojo, estas sendube medion protektantaj. Sed la fervojo, kies linioj situas paralele al la kanalo, perdas transportojn favore al la ŝiptrafiko. Tiu ĉi ricevis la kanalon praktike senkoste. La taksoj por ĝia uzo, precipe por la kluzoj, apenaŭ kovras la kostojn por la bontenado. Ankaŭ klimataj fluktuadoj limigas la konstantan utiligon de la kanalo, ekzemple alta aŭ malalta akvonivelo. En tiuj kazoj la fervojo estas preferata. Sed la fervojo ne volas esti nur la surrogatulo. Pro tio ĝi ekzamenas rabatotajn frajtojn por certaj kargoj kaj varoj. Malgraŭ tio fervoja kaj ŝipa trafikoj klopados ne nur konkurenci, sed laŭeble kunlabori, kiel tio efektiviĝas de longa tempo en aliaj partoj de Germanio. La klientoj devas konscii, kiu el la

transportsistemoj plej bone kovenas al iliaj deziroj.

W. B.

Fervojaj novaĵoj

Berlin. La reto de la regiona metro (S-Bahn) pli kaj pli grandiĝis, parte pro rekonstruo de eksteruzaj fervojlinioj, parte pro redono de linioj al DR, kiujn la senato de Berlin estis transpreninta en 1984 pro politikaj kaŭzoj.

Bern. En septembro 1992 la svisaj civitanoj decidis per referendumo pri la projekto "Alp Transit". Tiu unuflanke limigas la pezon de transitaj ŝarĝaŭtomobiloj el la Eŭropa Komunumo je 28 tunoj. Aliflanke Svislando estas per kontrakto devigita konstrui dum la venontaj 15 jaroj du gigantajn fervojtunelojn, tra kiuj ĉiuj transitaj ŝarĝaŭtomobiloj estos transportataj.

Frankfurt. DB esploras la konstruon de nova aŭtomata kuplilo. Tiu ĉi povas kupli ankaŭ vagonojn kun konvencia ŝraŭba kuplilo. La bremsoduktaj hosoj estas ankaŭ aŭtomate ligataj. La interligon inter la aŭtomata kuplilo kaj la trenhoko transprenas speciala kuploprenilo. En 1995 sekvos decido pri eventuala internacia enkonduko.

Helsinki. Finnaj Statfervoj (VR) mendis en Svislando 20 elektrajn trakiilojn. Ili similas al la svisa tipo "Lok 2000", estas kvaraksaj, pezas 84 tunojn kaj povas tiri pasaĝer-kaj vartrajnojn per maksimuma rapideco de 200 km/h.

Kopenhagen. Danaj Statfervoj (DSB) finos ĝis 1995 la elektrizadon de siaj fervojlinioj ĝis la suda limstacio Padborg. Poste fervojtransporto sur kontinue elektrizitaj linioj povos efektiviĝi inter Nordsvedio ĝis Suditalio.

Lübeck-Travemünde. Kompanio "Railship" naviganta depono 1975 inter Lübeck-Travemünde kaj Hanko (Finnlando) transportis en 1991 915 021 tunojn, inter ili 23 905 varvagonojn. La stacio Hanko disponas pri ŝpurŝanĝa instalaĵo por la finna ŝpuro (1524 mm) kaj por la kontinenta ŝpuro (1435 mm).

München. En septembro 1992 malfermiĝis en München-Riem la en Germanio plej moderna intermodala stacio. Ĉiutage povas esti ekspedataj 1000 ŝarĝaŭtomobiloj kaj 39 vartrajnoj.

Paris. La internacia porjunula bileto "Inter-Rail" plue validos sur fervojaj kaj ŝipaj linioj en 26 landoj, sed ĝia prezo konsiderinde altiĝos. Certaj sudeŭropaj fervojoj, kiuj ne plu pretis

portopreni tiun oferton, ricevos pli grandajn kvotojn el la enspezoj.

Wien. Surbaze de nova leĝo Aŭstria Federaciaj Fervojoj (ÖBB) ricevos ekde 1993 propran juran statuson. Ili estos liberigataj de budĝetaj devigoj krome de tarifaj kaj postenaj planoj.

Kompil. el "Blickpunkt Bahn" 9/92 de W. B.

ESPERANTO-FERNKURSE

I

ESPERANTO · EINE LEBENDIGE SPRACHE

EINFÜHRUNGSKURSUS

Sie erhalten:

- Lehrbuch
- Tonbandkassette
- 7 Lehrbriefe
- briefliche Betreuung
- Korrekturen
- Beratung

Sie steigen mit normalen Sätzen aus dem Alltag unmittelbar in die Sprache ein.

KOSTEN: 30.- DM

GEFA

II

FORTBILDUNGSKURSUS

KONVERSACIA KURSO

**Viele Situationen
des täglichen Lebens
werden als
Gesprächsstoff behandelt.**

Sie erhalten:

- Lehrbuch
- Tonbandkassette
- 15 Lehrbriefe
- briefliche Betreuung
- Korrekturen
- Beratung

KOSTEN: 40.- DM

- leicht und bequem daheim lernen -

MIT DIESEN LEHRGÄNGEN WERDEN SIE FLÜSSIG SPRECHEN

**ESPERANTO FLÜSSIG SPRECHEN ZU KÖNNEN, IST EIN ERLEBNIS
GÖNNEN SIE SICH DIESEN ERFOLG!**

Bestellen Sie bei: Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten,
Herrn Karl Bernhard, Sauerbruchstraße 8, W-6700 Ludwigshafen
Lieferung nach Zahlungseingang auf:
Konto 953 729 bei Sparda-Bank Frankfurt (M), BLZ 500 905 00

Redaktfino por n-ro 1/93 estas la 15.1.93

**Al niaj membroj kaj eksterlandaj geamikoj ni deziras ĝolĝan
Kristfeston kaj sukcesplenan Novan Jaron.**

Herausgeber/eldonanto:
Schriftleitung/redakcio:
Druck/preso:

Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main)
Wilhelm Graß, Sachsenstraße 7, W-8620 Lichtenfels
d.m-druck gmbh, Holsteiner Straße 80, W-2800 Bremen 1, Telefon 04 21 / 39 13 73